4-a Jaro. N-o 192 APERAS S.A.T. SEMAJNE 7. Junio 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

# FAŜISMO KAJ VATIKANO

Depost sia potenc-konkiro la faŝismo ne ĉesas teni la plej bonajn rilatojn al la Eklezio kaj la Sankta Seĝo. La registaro de Musolini rekonis la katolikismon kiel ŝtatan kulton. Ĝi respektis la romanajn tradiciojn kaj defendis la simbolojn de la religio. La nomo de dio denove estas aplikata en la oficialaj ceremonioj. La portreto de Kristo pendas en la tribunaloj kaj lernejoj, kaj la kruco estas restarigita en la Koloseo kaj sur la Kapitolo. La religia instruado fariĝis deviga en la elementa lernejo. La pastraro estas liberigita je pli pezaj militistaj devoj. Fine kelkaj religiaj festoj estas transformitaj en naciajn festojn, por kiuj la laborinterrompo estas leĝe fiksita. Aliparte, ĉiuokaze, la membroj kaj reprezentantoj de la registaro multobligis la pruvojn de respekta cedemo antaŭ la religiaj aŭtoritatoj. Interalie la "duce" donacis al la vatikana biblioteko la riĉan kolekton da libroj, manuskriptoj kaj dokumentoj de l' palaco Chigi. Siaflanke la Eklezio kaj la Sankta Seĝo ne restis malsentemaj je tiom da komplezemo. Ripete, la kardinaloj komplimentis la meritojn de l' ĉefo de la registaro. La papo mem deklaris, post la atenco de Bolonjo, ke la tuta Italio ektremis pro indignego kaj abomeno ĉe la freneza atenco, preparita kontraŭ "la homon, kiu tenas kun rimarkindaj forto de animo kaj kuraĝo la bridojn de la ŝtato". En tiu ĉi momento cetere la reciprokaj indulgoj ŝajnis plej naturaj. Faŝismo kaj katolikismo kredis povi samsenti en la sama spirito de konkordo kaj frateco. Ĉu ili ne estis movataj ambaŭ de la samaj sentoj pri ordo kaj hierarkio? Ĉu la du potencoj ne estis bazitaj sur la samaj principoj de absoluta disciplino kaj aŭtoritato?

Tia estis la roma atmosfero de 1920 ĝis 1926. Cetere, en tiu tuta periodo la faŝismo ankoraŭ ne precizigis sian doktrinon. Dume, iom post iom la konceptoj, la spiritostato, la filozofio de l' nova reĝimo videbliĝas. En ĉiu plua tago la riskema politiko preciziĝas, kaj sur la disrompaĵoj de l' malnovaj ideoj de l' liberalismo stariĝas politika aŭtoritatismo unu el la plej absolutaj. Samtempe, en tuta Italio, la plej arda naciismo penetras la moralajn kaj sociajn valorojn. La imperialista ideo aperas. La faŝista ŝtato konstruiĝas.

La proleta klaso ne povas senpasie, sen kolera indignego paroli pri tiu reĝimo de teroro, ĉar jam tro multajn viktimojn ĝi oferis, kiujn dronigis en sango la faŝistaj ekzekutistoj. Kaj pliaj vivoj aktuale estas minacataj . . .

Aliel rilatas al tiu reĝimo la Eklezio kun sia potenca aparato. Oni ne devas forgesi la persistan celadon de la roma eklezio, ne nur regi la spiritojn de la homoj per sia dogmo, sed ankaŭ akiri materian potencon. Ni memorigas pri la klopodoj de la paparo dum la mezepoko, krei tutmondan regnon teokratian, en kiu ili estus tutpovaj regnestroj. Ili fiaskis. La princoj restis venkantoj. Sed la papoj neniam rezignis je sia celado al absoluta superregado ne nur spirita, sed ankaŭ materia. Aliflanke la papoj devas atenti la katolikan "ŝafidaron", siajn regatojn. Tiuj lastaj prezentas amason tutmondan; ne estas superpezo en Italio. Sekve la Sankta Seĝo vole-nevole devas iel propri gi al si supernacian vidpunkton, dum la faŝismo mem estas esence nacieca. Fakte la Eklezio en sia italia parto estas trafita de la faŝist-idea marĉo: se ne la duagrada klerikularo tenas sin en rezervo, la episkoparo italia preskaŭ unuanime manifestas plej klare siajn aprobajn sentojn al la faŝismo. — De tiam ĝi serioze konsideras la danĝeron esti influata, kiom ajn malmulte, de la faŝismo. Fidela al sia opinio kaj sia doktrino, kiuj ĝin malhelpas submetiĝi al iu ajn ŝtato aŭ politika partio, ĝi volas montri, ke nenio pravigas kredi, ke ĝi aprobas senrezerve la faŝistan reĝimon. De tiu momento, la lerteco de Musolini puŝiĝas je la intenco de la Sankta Seĝo nepre malhelpi antaŭ la mondo eĉ la plej malgrandan konfuziĝon. La Vatikano ne timas de tiu momento rimarkigi nombron da konfliktoj inter la doktrinoj aŭ metodoj faŝistaj kaj katolikaj. La musoliniaj reformoj iris sub la pligrandigan vitron. Post publikigo de la Laborĉarto[1]) la papa organo rapidis rimarkigi, ke tiu ĉi novigaĵo ne akordiĝas "kun la kristana koncepto pri la ŝtato kaj la individua libereco". La faŝista iniciato publikigi grandan nacian eldonon de la verkaro de d' Anunzio estas publike mallaŭdita de Pio XI-a. Lastdata polemiko permesas konstati, kiom riĉa je opozicioj kaj konfliktoj estas la problemo de l' rilatoj inter la katolika Eklezio kaj la faŝista ŝtato.

Unu el la ĉefaj teoriistoj faŝistaj

[1]) Konstitucia dokumento pri laborregul-igo, kiu estas tradukita esperanten kaj estas disvastigata (parte senpage) en UEA-rondoj.